

GONG Xiaofeng
Universitato Nanchang, Ĉinio

Deriva vortfarado en la ĉina, la angla kaj Esperanto

Tipologia komparo

Resumo: Ĉi tiu artikolo komparas la derivajn vortfarajn rimedojn en la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto. Ĝi montras, ke kvankam ĉiuj tri lingvoj uzas diversajn strategiojn por krei novajn leksikajn unuojn, la mekanismoj, gradoj de reguleco kaj nivelo de produktiveco varias signife. En la ĉina lingvo, vortfarado plejparte baziĝas sur kunmetado, dum derivaj fenomenoj aperas en la formo de afiksoj kaj limigita tonŝanĝo. Tonŝanĝo kun deriva funkcio estas rimarkinda trajto, per kiu verbo povas transformiĝi al substantivo aŭ alia vortospeco, ofte sen ŝanĝo de la skriba formo aŭ kun partaj skribŝanĝoj. En Esperanto, vortfarado estas tre regula kaj travidebla, bazita sur sisteme kombineblaj radikoj kaj afiksoj. En la angla, derivado prezentas miksitan sistemon kun afiksado, konvertiĝo kaj akcentŝanĝo. La studo montras, ke konsideri morfologiajn, fonologiajn kaj tipologiajn faktorojn estas fundamentaj por kompreni la naturon de deriva vortfarado.

Ŝlosilvortoj: deriva morfologio; vortfarado; afiksoj; tonŝanĝo; ĉina lingvo; angla lingvo; Esperanto

1 Enkonduko

Morfologio estas tiu branĉo de lingvistiko, kiu studas la internan strukturon de vortoj kaj la ŝanĝojn, kiujn vortoj spertas en lingva uzo (Spencer kaj Zwicky 2001).¹ En praktiko, tamen, la termino ofte estas mallarĝigita al fleksia morfologio, kio kondukis al la ofte ripetata aserto, ke la ĉina lingvo “ne havas morfologion”. Tiu aserto efektive rilatas nur al la preskaŭa manko de fleksiaj ŝanĝoj, sed ne al la tuta sistemo de vortfarado.

El tipologia vidpunkto, la ĉina lingvo estas ĝenerale konsiderata forte izolanta lingvo; la angla lingvo montras miksitajn trajtojn inter analiza kaj fleksia tipo; kaj Esperanto estas ofte priskribata kiel preskaŭ ideale aglutina

1 La aŭtoro elkore dankas Profesorinon Ilona Koutny pro la valoraj komentoj, proponoj kaj polurado de la teksto.

lingvo kun alta grado de reguleco. El sintaksa vidpunkto, jam ekde antikvaj tempoj la ĉina ĉefe utiligis partikulojn kaj vortordon por esprimi gramatikajn signifojn. La fakto, ke frazoj en la ĉina estas konstruitaj per rekta realigo de vortgrupoj, ne per morfologiaj ŝanĝoj de vortoj, fariĝis ĝenerala konsento inter ĉinaj lingvistoj (Gong 1987; Li 2009).

La ŝajna problemoj devenas ne de manko de morfologio en la ĉina lingvo, sed de malsama difino de la termino mem. Se morfologio estas komprenata en pli vasta senco, inkluzivante kaj fleksian kaj derivan morfologion, evidentiĝas ke ankaŭ en la ĉina lingvo ekzistas morfologiaj procezoj, precipe en kunmetado kaj aliaj deriva-similaj fenomenoj.

- (1) Surbaze de tiu kompreno, ĉi tiu artikolo celas kompari la derivajn rimedojn en la tri lingvoj por montri kiel tipologie malsamaj lingvoj realigas vortformadon per malsamaj strukturoj kaj rimedoj, kaj tiel klarigi la specifan pozicion de la ĉina lingvo en morfologia komparo.

2 Morfologiaj trajtoj de la ĉina lingvo

En la ĉina lingvo, vorto plej ofte konsistas el unu aŭ pluraj ĉinaj signoj, kaj ĝia signifo povas esti interpretita laŭ ĝiaj kunmetitaj ideogramoj. La morfologiaj strukturoj de ĉinaj vortoj estas formataj per tri gravaj procezoj en lingvistiko: kunmetado, afiksado kaj konvertiĝo. La ĉefa vortfarada mekanismo estas kunmetado, kiu estas tre produktiva (Hu 2008; Xu 2020).

Ĝenerale, ĉinaj morfemoj povas funkcii kiel signoj kaj samtempe aparteni al specifaj vortpartoj, kio estas konfirmita ankaŭ per empiriaj studoj pri vortklasaj trajtoj de morfemoj en ĉinaj kunmetaĵoj (Chen kaj Duan 2016). En kelkaj kazoj, ĉina morfemo povas havi neniun klaran leksikan signifon kaj funkcii ĉefe por igi la vorton pli legebla aŭ fonologie pli stabila. Cheng kaj Tian (1992) dividis ĉinajn vortojn en kvin morfologiajn tipojn bazitajn sur la rilatoj inter la morfemoj en kunmetado de vortoj. Jen la kvin tipoj:

(1) Paralela Tipo

Du morfemoj ludas kunorditajn rolojn en unu vorto. Ekzemple, la morfemoj “财” [cái] (*money, mono/riĉaĵoj*) kaj “富” [fù] (*wealth, riĉo*) estas samrangaj en la vorto “财富 [cái fù]” (*money-wealth, riĉeĉo*).

(2) Substantiva-modifa Tipo

Modifanta morfemo antaŭas modifatan morfemon. Ekzemple, kompare la ĉinan kun la angla, la morfemo “哭 [kū]” (*cry, plori*) estas modifita per “痛 [tòng]” (*bitterly, ekstreme; profunde*) en la vorto “痛哭 [tòng kū]” (*bitterly-cry, plorego, dolore plori*). Sed en Esperanto, simila signifo povas esti esprimita per la sufikso -eg-, kiel en plor’eg-i aŭ plor’eg’o.

(3) Tipo subjekto-predikato

Unu morfemo funkcias kiel subjekto, dum la alia kiel predikato; la strukturo similas al subjekt-verba frazo densigita en unu vorto. Ekzemple, la morfemo "心 [xīn]" (*heart*, koro) estas la subjekto de la predikato "痛 [tòng]" (*hurt*, doloro) en la vorto "心痛 [xīn tòng]" (*heart-hurt*, kor-doloro).

(4) Tipo verbo-objekto

La unua morfemo estas verbo, kiu regas la duan, tiel ke la tuta vorto strukture similas al verbo-objekta frazo. Ekzemple, en la vorto "失控" [shī kòng] (*lose-control*, perdi regadon), la morfemo "失 [shī]" (*lose*, perdi) funkcias kiel verbo, kaj "控 [kòng]" (*control*, regado) kiel ĝia objekto. En Esperanto, oni povus esprimi tion per perdi regadon aŭ priskribi la staton kiel senbrida.

(5) Tipo verbo-komplemento

La unua morfemo estas verbo sed foje ankaŭ povas esti adjektivo; la dua morfemo klarigas aŭ precizigas la unuan el diversaj aspektoj. Ekzemple, la morfemo "清 [qīng]" (*clearly*, klare) esprimas la aspektojn de la ago "看 [kàn]" (*look*, vidi) en la vorto "看清 [kàn qīng]" (*look clearly*, vidi klare).

Krom kunmetado, ekzistas ankaŭ fenomenoj interpreteblaj kiel derivaj, inkluzive de afiksoj kaj fonologiaj alternoj.

3 Komparo de deriva vortfarado

Ĉar multaj legantoj jam konas la ĉefajn trajtojn de la angla kaj Esperanta morfologio, mi nur skizos ilin ĉi tie por pli klare kompari ilin kun la ĉina.

La Esperanta vortfarado baziĝas sur sistema kaj regula kombino de radikoj, afiksoj kaj gramatikaj finaĵoj, kio ofte estas konsiderata unu el la plej karakterizaj trajtoj de la lingvo (Wells 1989; Wennergren 2020). Tiu reguleco estas konfirmita ankaŭ per empiriaj esploroj bazitaj sur lingvouzo (Gledhill 2000).

Ĉiu radiko povas akiri malsamajn vortospecojn per la aldono de la vortoklasaj finaĵoj -o, -a, -e kaj -i, kio ebligas sisteman transiron inter vortospecoj. Krome, la lingvo permesas produktivan kunmetadon de radikoj kaj afiksoj, kun ĝenerale alta grado de semantika travidebleco (Wennergren 2020). Sufiksoj povas ŝanĝi la vortospecon aŭ modifi la signifon, dum prefiksoj plejofte konservas la vortospecon kaj influas ĉefe la leksikan signifon. Multaj afiksoj povas funkcii ankaŭ kiel memstaraj elementoj (ekz. eta, aĉa), kio montras la flekseblecon de la sistemo (Jansen 2016).

Kompare kun Esperanto, la angla lingvo uzas afiksadon en malpli regula maniero, dum la ĉina lingvo prezentas tute alian modelon de deriva vortfarado. En la ĉina lingvo, vortfarado kun deriva funkcio realiĝas ĉefe per du rimedoj: afiksa derivado kaj tonŝanĝo. La afiksa derivado en la ĉina montras certajn paralelojn kun la angla kaj Esperanto, sed samtempe elmontras proprajn strukturajn trajtojn, ne plene priskribeblaj per eŭropaj morfologiaj modeloj.

3.1 Ŝanĝi la vortospecon per deriva afiksado

3.1.1 Sufiksa metodo

En la angla lingvo, derivado ofte okazas per sufiksado, kiu ofte ŝanĝas la vortospecon (ekz. verbo → substantivo) (Yuan 2004). Kaj tia deriva procezo ludas gravan rolon en la formado de novaj vortoj kaj neologismoj (Algeo kaj Adele 1991). Ekzistas pluraj grupoj en la angla; en la sekva listo, du grupoj estas konataj ekzemploj:

(1) Aldoni /-ər/ (ortografie -or aŭ -er) por transformi verbon en substantivon

investigate (esplori) → *investigator* (esplor'ist'o)

survive (postvivi) → *survivor* (postviv'ant'o)

instruct (instrui) → *instructor* (instru'ist'o)

teach (instrui) → *teacher* (instru'ist'o)

travel (vojaĝi) → *traveler* (vojaĝ'ant'o)

(2) Aldoni /-fion/ (ortografie -ion) por transformi verbon en substantivon

infect (infekti) → *infection* (infekt'o, infekt'ad'o)

interact (interagi) → *interaction* (interag'o, interag'ad'o)

contribute (kontribui) → *contribution* (kontribu'o, kontribu'ad'o)

En Esperanto, la sama funkcio realiĝas pli simple, pli vaste kaj pli regule. Ekzemple, per la finaĵo **-o**, aŭ foje per la derivaj sufiksoj **-ad-**, **-aĵ-**, **-ant-**, **-ist-** ktp., radiko verba facile transformiĝas en substantivon:

infekti (verbo) → infekt'o, infekt'ad'o, infekt'aĵ'o (substantivo)

interagi (verbo) → interag'o, interag'ad'o (substantivo)

kontribui (verbo) → kontribu'o, kontribu'ad'o, kontribu'aĵ'o,

kontribu'ant'o (substantivo)

Simile al tio, ankaŭ en la ĉina lingvo verboj aŭ adjektivoj povas esti transformitaj en substantivojn per la aldonado de certaj substantivaj sufiksoj, kiel morfemoj **-子** [zǐ] (sufikso de substantivo), **-儿** [ér] (sufikso de

nesilaba “r” al substantivoj aŭ iafoje al verboj) kaj -头 [tou] (sufikso aldonita al substantivo, verbo, aŭ adjektivo), ktp.. Kiel sufiksoj, tiuj morfemoj kutime ne havas propran signifon kaj ĉefe servas por vortfarado.

Ekzemple:

- (1) **Substantiviga sufikso -子 [zǐ] por materialaj agoj** (transformas verbojn kaj adjektivojn en konkretajn substantivojn, plej ofte ilojn aŭ personojn)

Radiko	Signifo	+ -子 [zǐ]	Rezulta substantivo	Tipo/Funkcio
El verboj				
推 [tuī]	puŝi, ŝovi, tondi	推子 [tuī zǐ]	tondomaŝino	ilo
盖 [gài]	kovri	盖子 [gài zǐ]	kovr'il'o	ilo
梳 [shū]	kombi	梳子 [shū zǐ]	komb'il'o	ilo
扣 [kòu]	buton(um)i	扣子 [kòu zǐ]	butono; nodo	objekto
剪 [jiǎn]	tranĉi	剪子 [jiǎn zǐ]	tranĉ'il'o	ilo
铲 [chǎn]	ŝoveli	铲子 [chǎn zǐ]	ŝovel'il'o	ilo
刷 [shuā]	brosi	刷子 [shuā zǐ]	broso; peniko	ilo
骗 [piàn]	trompi	骗子 [piàn zǐ]	tromp'ist'o; tromp'ant'o	persono
El adjektivoj:				
傻 [shǎ]	malsaĝa	傻子 [shǎ zǐ]	malsaĝ'ul'o	persono
聋 [lóng]	surda	聋子 [lóng zǐ]	surd'ul'o	persono
瞎 [xiā]	blinda	瞎子 [xiā zǐ]	blind'ul'o	persono
瘸 [qué]	lama	瘸子 [qué zǐ]	lam'ul'o	persono
疯 [fēng]	freneza	疯子 [fēng zǐ]	frenesz'ul'o	persono
胖 [pàng]	dika	胖子 [pàng zǐ]	dik'ul'o	persono
秃 [tū]	kalva	秃子 [tū zǐ]	kalv'ul'o	persono

(2) **Substantiviga sufikso -头 [tou] por abstraktaj kaj mensaj nocioj**
(transformas verbojn, adjektivojn kaj substantivojn en abstraktajn aŭ ĉiutagajn substantivojn)

Radiko	Signifo	+ -头 [tou]	Rezulta substantivo	Tipo/ Funkcio
El verboj				
盼 [pàn]	espero; deziri	盼头 [pàn tou]	espero; bonaj perspektivoj	rezulto de ago
说 [shuō]	diri	说头 [shuō tou]	io por preparolo; temo de diskuto; preteksto	objekto de ago
看 [kàn]	rigardi; vidi; spekti	看头 [kàn tou]	io meritas esti vidata/vizitata/legata	valoro de ago
念 [niàn]	pensi; sopiri	念头 [niàn tou]	ideo; penso; intenco	rezulto de ago
想 [xiǎng]	pensi; pripensi; opinii	想头 [xiǎng tou]	ideo; espero	rezulto de ago
唱 [chàng]	kanti	唱头 [chàng tou]	sonprenilo; pikupo	teknika ilo
奔 [bèn]	sin direkti al; iri al	奔头 [bèn tou]	estonteco; perspektivo	celo de ago
El substantivoj				
木 [mù]	ligno	木头 [mù tou]	ligno; ŝtipo	pli ĉiutaga
石 [shí]	ŝtono; roko	石头 [shí tou]	ŝtono; roko	pli ĉiutaga
El adjektivoj				
甜 [tián]	dolĉa; sukera; miela	甜头 [tián tou]	dolĉeta gusto; profito	eco
准 [zhǔn]	preciza; ekzakta; ĝusta	准头 [zhǔn tou]	precizeco; ekzakteco; ĝusteco	eco

(3) **Substantiviga sufikso -儿 [ér] (-r) por materiaj elementoj derivitaj el verboj** (transformas verbojn kaj adjektivojn en konkretajn substantivojn; aldonas diminutivan aŭ emocian nuancon al substantivoj)

Radiko	Signifo	+ -儿 [ér] (-r)	Rezulta substantivo	Tipo/Funkcio
El verboj:				
套 [tào]	kovri per; tegi	套儿 [tàoer]	ingo; tego; kovrilo; nodo; maŝo	ilo/objekto
盖 [gài]	kovri; surmeti	盖儿 [gàier]	kovrilo; fermoplato;	ilo
画 [huà]	desegni; pentri	画儿 [huàer]	bildo; pentraĵo; desegnaĵo	rezulto de ago
吃 [chī]	manĝi	吃儿 [chīer]	io por manĝi	manĝaĵo
唱 [chàng]	kanti	唱儿 [chànger]	kanto; kanta parto en tradicia ĉina opero	rezulto de ago
El adjektivoj:				
尖 [jiān]	akrapinta; pinta	尖儿 [jiāner]	pinto; pinta ekstremaĵo	objekto/parto
亮 [liàng]	luma; hela; brila	亮儿 [liànger]	lumo; brilo; lamplumo	fenomeno
El substantivoj:				
马 [mǎ]	ĉevalo	马儿 [mǎer]	ĉevalo	konkrete + emocia nuanco
小猫 [xiǎo māo]	kateto	小猫儿 [xiǎo māoer]	kateto	konkrete + emocia nuanco

Noto: En la ĉina fonetika skribo “Hanyu Pinyin”, la finaĵo “儿” ne estas elparolata kiel memstara silabo “ér”, sed kunfandiĝas kun la antaŭa vokalo por formi retrofleksan sonon, reprezentatan per “-r” en la skribo.

(4) **Substantiviga sufikso -者 [zhě] por istoj derivitaj de verboj**
(transformas verbojn en personojn, kiuj faras la agon; uzata en formalaj kuntekstoj)

Radiko	Signifo	+ -者 [zhě]	Rezulta substantivo	Tipo/Funkcio
记 [jì]	noti; enskribi	记者 [jì zhě]	ĵurnalisto; gazetisto; raportisto	profesio (persono)
作 [zuò]	skribi; verki	作者 [zuò zhě]	aŭtoro; verkisto	rolo (persono)
学 [xué]	lerni; studi	学者 [xué zhě]	klerulo; scienculo; erudiciulo	okupo/stato (persono)
开拓 [kāi tuò]	ekspluati	开拓者 [kāi tuò zhě]	pioniro; ekspluatanto	rolo (persono)
读 [dú]	legi	读者 [dú zhě]	leganto	aganto
译 [yì]	traduki	译者 [yì zhě]	tradukisto	profesio (persono)
工作 [gōng zuò]	labori	工作者 [gōng zuò zhě]	laboristo; laboranto	aganto
研究 [yán jiū]	esplori	研究者 [yán jiū zhě]	esploristo	profesio/ aganto

Kompara tabelo de ĉiuj kvar substantivigaj sufiksoj

Aspekto	-子 [zǐ]	-头 [tóu]	-儿 [ér]	-者 [zhě]
Ĉefa funkcio	Konkretaj substantivoj (iloj, personoj)	Abstraktaj substantivoj (rezultoj, valoroj)	Konkretaj + emociaj nuancoj	Agentaj substantivoj (personoj)
El verboj	Iloj, objektoj, personoj	Rezultoj, valoroj, celoj	Iloj, rezultoj, manĝaĵoj	Agantoj, profesioj
El adjektivoj	Personoj kun eco (uloj)	Ecoj mem (abstraktaj)	Objektigitaj ecoj	(Malofte)
El substantivoj	(Malofte)	Familiara, ĉiutaga formo	Diminutivo, emocia nuanco	(Malofte)
Stila nuanco	Neŭtrala (iom negativa en kelkaj)	Parola, ĉiutaga	Parola, emocia	Formala, respektplena
Produktiveco*	Tre alta	Alta	Alta (nordaj dialektoj)	Tre alta (precipe en skriba lingvo)

*Produktiveco ĉi tie signifas la kapablon de la sufikso krei novajn vortojn en la nuna lingvo.

3.1.2 Prefiksa metodo

Unu el la karakterizaĵoj de la angla morfologia vortfarado estas, ke sufiksoj ofte ŝanĝas la vortospecon, dum aldonitaj prefiksoj ordinare ŝanĝas nur la leksikan signifon sen influi la vortospecon.

Oni povas kompari la jenajn du grupojn:

- (1) Sufiksoj: ŝanĝo de vortospeco sen (granda) ŝanĝo de baza signifo:
interview (verbo, intervjui) → *interviewee* (substantivo, intervju'it'o)
interact (verbo, interagi) → *interaction* (substantivo, interag'o, interag'ad'o)
frequent (adjektivo, ofta) → *frequently* (adverbo, oft'e)
environment (substantivo, medio) → *environmental* (adjektivo, medi'a)
- (2) Prefiksoj: ŝanĝo de leksika signifo sen ŝanĝo de vortospeco:
regular (adjektivo, regula) → *irregular* (adjektivo, mal'regula, ne'regula)
possible (adjektivo, ebla) → *impossible* (adjektivo, mal'ebla, ne'ebla)
likely (adjektivo, verŝajna) → *unlikely* (adjektivo, ne'verŝajna)
like (verbo, ŝati) → *dislike* (verbo, mal'ŝati)

En la unua grupo, pere de la aldonitaj sufiksoj kiel -ee, -ion, -ly, -al, la vortspecoj klare ŝanĝiĝas: la originalaj verboj "*interview*" kaj "*interact*" fariĝas la substantivoj "*interviewee*" kaj "*interaction*" respektive; la adjektivo "*frequent*" konvertiĝas al la adverbo "*frequently*", kaj la substantiva "*environment*" transformiĝas al la adjektivo "*environmental*".

En Esperanto, la vortospeco estas ĉefe determinata de la gramatikaj finaĵoj (-o, -a, -e, -i). La sufiksoj en derivado ne rekte ŝanĝas la vortospecon, sed kontribuas al la deriva aŭ semantika signifo de la radikoj.

Ekzemple:

- intervjui → intervju'**it**'o (verbo → substantivo)
 interagi → interag'**ad**'o (verbo → substantivo)
 riĉa → riĉ'**ec**'o (adjektivo → substantivo)
 amiko → amik'**ig**'i (substantivo → verbo)
 ŝanĝi → ŝanĝ'**ig**'i (verbo → verbo)
 granda → grand'**eg**'a (adjektivo → adjektivo)

Prefiksoj plejofte ne influas la vortospecon, sed modifas la signifon de la tuta vorto:

- granda → **mal'**granda (adjektivo → adjektivo)
 patro → **bo'**patroj (substantivo → substantivo)
 salti → **ek'**salti (verbo → verbo)

Tiu distingo estas karakteriza trajto de la Esperanta morfologia sistemo kaj diferencas de lingvoj kiel la angla aŭ la ĉina, kie vortospeco ofte dependas pli de leksikaj aŭ sintaksaj faktoroj.

Kompare kun la angla kaj Esperanto, la ĉina lingvo montras samtempe kaj similajn kaj malsimilajn trajtojn en prefiksa derivado. Kvankam la plej multaj prefiksoj en la ĉina lingvo, simile al anglaj prefiksoj, ne ŝanĝas la vortospecon, tamen ekzistas ankaŭ kelkaj prefiksoj, kiuj ja povas ŝanĝi la vortospecon (kiel montrite en la sekvaj ekzemploj). Unue, ni rigardu ekzemplojn de prefiksoj kiuj konservas la vortospecon:

妈妈 [mā mā] (patrino) → 准妈妈 [zhǔn mā mā] (onta patrino, patriniĝonto) – ambaŭ substantivoj

现代 [xiàn dài] (moderna, moderna epoko) → 后现代 [hòu xiàn dài] (postmoderna, postmoderna epoko) – ambaŭ adjektivoj/substantivoj

Multaj tiaj prefiksoj devenas de tradukaj praktikoj kaj estas forte influitaj de okcidentaj lingvoj. Tamen, en la ĉina lingvo ekzistas ankaŭ kelkaj ofte uzataj prefiksoj, kiuj povas foje ŝanĝi la vortospecon, kaj kelkaj el ili funkcias laŭ relative regulaj leĝoj.

Ekzemple:

(1) Ŝanĝo de vortospecoj per “小- [xiǎo]” (malgranda; eta)

Radiko (verbo)	Signifo	+小- [xiǎo]	Rezulta substantivo
偷 [tōu]	ŝteli	小偷 [xiǎo tōu]	ŝtelisto; poŝtoŝtelisto
吃 [chī]	manĝi	小吃 [xiǎo chī]	rapida plado; manĝeto
说 [shuō]	diri	小说 [xiǎo shuō]	romano; novelo
贩 [fàn]	kolporti	小贩 [xiǎo fàn]	kolportisto; stratvendisto
结 [jié]	fini	小结 [xiǎo jié]	mallonga resumo; resumo
写 [xiě]	skribi; verki	小写 [xiǎo xiě]	minusklo; malgranda litero
炒 [chǎo]	kirle-friti	小炒 [xiǎo chǎo]	plado aparte fritita (kuirita) en malgranda kuirpoto

(2) Ŝanĝo de vortospecoj per “所-” [suǒ] (helpa vorto)

Radiko (verbo)	Signifo	+所- [suǒ]	Rezulta substantivo
思 [sī]	pensi	所思 [suǒ sī]	penso; ideo
为 [wéi]	fari; agi	所为 [suǒ wéi]	faro, ago
想 [xiǎng]	pensi; opinii; supozi; deziri; intenci	所想 [suǒ xiǎng]	ideo; opinio
得 [dé]	akiri; gajni; ricevi	所得 [suǒ dé]	enspezo; gajno; profito

(3) Ŝanĝo de vortospecoj per “老-” [lǎo] (maljuna)

Radiko	Signifo	+老- [lǎo]	Rezulta substantivo
大 [dà]	granda	老大 [lǎo dà]	plejaĝa filo aŭ frato; (dialekto) posedanto de ŝipo
三 [sān]	tri	老三 [lǎo sān]	la tria infano en familio

(4) Prefiksoj kun ritma aŭ formala funkcio

Krom la ŝanĝo de vortospeco, 老- [lǎo] plenumas ankaŭ aliajn gravajn funkciojn en la ĉina vortfarado. Oni povas distingi tri pliajn kategoriojn:

(a) Emocia aŭ socia funkcio: Antaŭ familiaj nomoj aŭ titoloj, 老- [lǎo] esprimas intimecon, respekton aŭ ordon de pliageco:

王 [wáng] (familinomo) → 老王 [lǎo wáng] (kara Wang; amiko Wang; kolego Wang; respektinda Wang; pli aĝa Wang)

Sed 师 [shī] (instruisto) → 老师 [lǎo shī] (instruisto) estas fakte norma vorto, ne esprimas apartan intimecon - ĝi simple estas la norma vorto por instruisto. 师 [shī] sole ne estas ofte uzata.

- (b) Ritma aŭ prozodia funkcio: En la moderna ĉina lingvo ekzistas ĝenerala tendenco al dusilabeco en la leksika vortfarado, precipe en oftaj substantivoj kaj ĉiutagaj esprimoj. En tiu kunteksto, la prefikso 老- [lǎo] ofte aperas antaŭ besto- aŭ plantnomoj por krei dusilaban formon:

虎 [hǔ] (tigro) → 老虎 [lǎo hǔ] (tigro)

鼠 [shǔ] (rato, muso) → 老鼠 [lǎo shǔ] (rato, muso)

鹰 [yīng] (aglo) → 老鹰 [lǎo yīng] (aglo)

Tiu fenomeno ne validas por ĉiuj vortospecoj aŭ ĉiuj sintaksaj strukturoj, sed estas plej evidenta ĉe substantivoj en la leksika nivelo. En tiuj kazoj, la prefikso apenaŭ aldonas leksikan signifon; ĝia ĉefa rolo estas fonologia, ĉar ĝi transformas unusilaban radikon en pli tipan dusilaban unuon.

- (c) “Redunda” aŭ formala funkcio: En kelkaj vortoj, 老- [lǎo] fariĝis preskaŭ deviga parto de la vorto sen klara signifoŝanĝo:

百姓 [bǎi xìng] (popolo) → 老百姓 [lǎo bǎi xìng] (ordinaraj homoj) – ĝi aldonas nuancon de ĉiutageco, sed ne fundamentan signifon.

Tiu ĉi funkcio de prefiksoj – krei preferatan silaban strukturon aŭ aldoni socilingvistikajn nuancojn – estas grava karakterizaĵo de la ĉina vortfarado, kiu distingas ĝin de lingvoj kiel Esperanto, kie prefiksoj ĉefe modifas la leksikan signifon.

3.2 Fonologiaj rimedoj

Fonologiaj rimedoj povas ludi gravan rolon en deriva morfologio. Tiaj fenomenoj ne estas plene produktivaj kaj ofte estas parte leksikigitaj. En la angla lingvo, ekzemple, vortoj povas esti derivitaj per ŝanĝo de akcento, kiel en la konataj paroj:

record /ri'kɔ:d/ (registri, surbendigi) → *record* /'rekɔ:d/ (disko, rikordo, rekordo)

address /ə'dres/ (adresi, alparoli) → *address* /'ædres/ (adreso)

En Esperanto, la akcento ĉiam falas sur la antaŭlastan silabon.

En la ĉina lingvo, tamen, ekzistas alia speco de fonologia rimedo: tonŝanĝo, kiu en kelkaj kazoj povas esti interpretata kiel deriva mekanismo. Per ŝanĝo de tono, ofte al la kvara tono (malsuprena tono, 去声² qù shēng), verbo povas transformiĝi al substantivo aŭ alia vortospeco. Tiu fenomeno povas esti konsiderata kiel tonŝanĝo kun deriva funkcio, per kiu la leksika statuso de vorto ŝanĝiĝas sen aŭ kun ŝanĝo de la skriba formo.

2 【去声】 [qù shēng] “malsuprena tono” (la kvara el la kvar tonoj en la prononcado de la moderna ĉina lingvo)

La jenaj ekzemploj ilustras tiun fenomenon. En la sekvaj tabeloj, la ciferoj en krampoj (1, 2, 3, 4) indikas la tonon de la silabo laŭ la norma ĉina prononco.

Grupo A (ŝanĝo de tono, skribo restas la sama)

Radiko (verbo)	Signifo (verbo)	Derivaĵo (substantivo)	Signifo (substantivo)	Rimarkoj
观 [guān] (1)	rigardi; vidi, observi	观 [guàn] (4)	taŭisma templo	Etimologie: “loko por observado” – antikvaj observejoj iĝis temploj
钻 [zuān] (1)	bori	钻 [zuàn] (4)	drilo; borilo; diamanto	ago → ilo
数 [shǔ] (3)	kalkuli; nombri	数 [shù] (4)	nombro; cifero	ago → rezulto
量 [liáng] (2)	mezuri	量 [liàng] (4)	kvanto; kapacito	ago → rezulto
铺 [pū] (1)	etendi; sterni	铺 [pù] (4)	butiko; vendejo	ago → loko (sur kiu oni sternas varojn)
把 [bǎ] (3)	teni	把 [bà] (4)	tenilo; anso; manilo	ago → ilo
圈 [juān] (1)	enfermi (brutojn); ĉirkaŭbari	圈 [juàn] (4)	stalo; gregejo; ŝedo	ago → loko

Grupo B (ŝanĝo de tono kaj skribformo)

Radiko (verbo)	Signifo (verbo)	Derivaĵo (substantivo)	Signifo (substantivo)	Rimarkoj
登 [dēng] (1)	ascendi; grimpi	凳 [dèng] (4)	tabureto; benko	ago → objekto (sur kiu oni grimpas) → sidilo.
分 [fēn] (1)	dividi; apartigi	份 [fèn] (4)	parto; porcio	ago → rezulto
连 [lián] (2)	ligi; kunligi; kunigi	链 [liàn] (4)	ĉeno	ago → objekto (ilo por ligi)
研 [yán] (2)	pisti; mueli; studi	砚 [yàn] (4)	inkoŝtono; tuĉfrota ŝtonplato	ago → ilo (ŝtono uzata por prepari ĉinan inkon per muelado)

En Grupo A, la deriva rilato estas semantike travidebla: la rezultaj formoj esprimas ilon, lokon aŭ rezulton de la ago.

Sed en Grupo B: La rilato inter 登 [dēng] kaj 凳 [dèng] estas iom malpli rekta. Eble 凳 devenas de “tabulo sur kiu oni grimpas” (por atingi pli altan lokon) aŭ simple “io levita por sidi”. La skriba ŝanĝo (aldono de 几 “tabureto”) helpas distingi la novan signifon. 分 [fēn] estas la ago dividi, 份 [fèn] estas la rezulto de divido – parto, porcio. La skriba ŝanĝo (aldono de 人 “homo”) eble indikas “parto destinita al homo”. 连 [lián] estas la ago ligi, 链 [liàn] estas la objekto uzata por ligi (ĉeno). La skriba ŝanĝo (aldono de 金 “metalo”) montras la materialon. Tamen, la rilato inter 研 [yán] kaj 砚 [yàn] ne estas kazo de regula morfologia derivado, sed reflektas historian kaj semantikan rilaton inter ago kaj ilo. La elemento 石 “ŝtono” en 砚 funkcias kiel semantika radikalo indikanta la materialon, ne kiel deriva morfemo en la strikta senco.

Gravas emfazi, ke tia tonŝanĝa derivado ne estas plene regula aŭ produktiva en la sama senco kiel afiksa derivado en Esperanto aŭ parte en la angla. Tial tonŝanĝo estas plej bone komprenata kiel fenomeno ĉe la interfaco inter fonologio kaj morfologio, prefere ol kiel regula deriva procezo.

El tipologia vidpunkto, tiu fenomeno montras, ke eĉ en la ĉina lingvo, ofte priskribata kiel izolanta, ekzistas limigitaj rimedoj por esprimi derivajn rilatojn per internaj fonologiaj ŝanĝoj, ne nur per eksplikitaj afiksaj elementoj.

4 Konkludo

La komparo montras, ke la tri lingvoj uzas malsamajn strategiojn por vortfarado.

En la ĉina lingvo, derivado plej ofte okazas per kunmetado, sed ankaŭ per prefiksoj kaj tonŝanĝoj. Tonŝanĝo kun deriva funkcio permesas verbojn transformiĝi al aliaj vortospecoj sen ŝanĝo de la skriba formo, trajto grava sed relative malmulte esplorita. Prefiksoj ofte ne ŝanĝas la vortospecon kaj foje reflektas influon de okcidentaj lingvoj.

En Esperanto, sufiksoj kaj prefiksoj havas klaran derivan rolon kaj funkcias laŭ relative regulaj principoj; akcento restas senŝanĝa, do fonologiaj transformoj ne estas uzataj por indiki novajn vortospecojn.

En la angla lingvo, derivado kombinas afiksojn kun konvertiĝo kaj akcentŝanĝo; akcentŝanĝo povas indiki vortspecan ŝanĝon, kontraste al ĉina tonŝanĝo.

Tiu komparo montras tri tipologiajn strategiojn de vortfarado: ĉina lingvo baziĝas sur kunmetado kun limigita afiksa kaj tonfleksia derivado; Esperanto uzas sisteman kaj travideblan afikso-bazitan mekanismon; angla lingvo kombinas afiksan derivadon kun konvertiĝo kaj akcentŝanĝo. Ĉi

tiuj kontrastoj reflektas la fundamentajn diferencojn inter izola, miksitaj kaj aglutinaj lingvosistemoj, kaj subtenas pli profundan komprenon pri la universala kaj lingvo-specifa strukturo de vortoj.

Bibliografio

- Algeo, John kaj Adele S. Algeo. 1991. *Fifty Years among the New Words: A Dictionary of Neologisms 1941–1991*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Chen, Changyong 陈昌勇, kaj Duan Musan 端木三. 2016. 双音节复合词内部语素的词类标注和统计分析 “Part-of-Speech Annotation of Morphemes in Disyllabic Compounds”. 汉语学习 *Hanyu Xuexi* kajero 1: 30–41.
- Cheng, Xianghui kaj Tian, Xiaolin. 1992. *Modern Chinese*. Bookman Books.
- Gledhill, Christopher. 2000. *The Grammar of Esperanto: A Corpus-Based Description*. München: Lincom Europa.
- Gong, Qianyan 龚千炎. 1987. 中国语法学史稿 ‘*Historio de Ĉina Gramatiko*’. Beijing: 语文出版社 Lingva Eldonejo.
- Hu, Zhuanglin 胡壮麟. 2008. 语言学教程 ‘*Lingvistika Kurso*’. Beijing: Pekina Universitato Eldonejo.
- Jansen, Wim. 2016. “Derivation in the Lexicon: The Case of Esperanto”. *Linguistics* 54, kajero 5: 1101–1133. <https://doi.org/10.1515/ling-2016-0024>
- Li, Rulong 李如龙. 2009. 汉语和汉字的互动与和谐发展 “On the Interactivity and Harmonious Development of Chinese and Chinese Characters”. 吉林大学社会科学学报 *Jilin University Journal Social Sciences Edition* 49, kajero 2: 108–116.
- Spencer, Andrew, kaj Arnold M. Zwicky. 2001. *The Handbook of Morphology*. Oxford: Blackwell.
- Wells, John C. 1989. *Lingvaj aspektoj de Esperanto*. 2-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wennergren, Bertilo. 2020. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.
- Xu, Yuqing 徐玉青. 2020. 英汉构词法比较分析 “Comparative Analysis of Word Formation in English and Chinese”. 现代英语 *Moderna Angla Lingvo* kajero 11: 98–100.
- Yuan, Ronger 袁荣儿. 2004. 论英汉词汇形态学的对比差异 “A Contrastive Analysis of English and Chinese Lexical Morphology”. 浙江工业大学学报 (社会科学版) *Journal of Zhejiang University of Technology (Social Science)* 3, kajero 1: 62–67.

Pri la aŭtoro

GONG Xiaofeng (Arko) estas emerita profesoro pri media scienco kaj inĝenierado kun doktoriĝo en nutraĵscienco en la Universitato de Nanchang (Ĉinio). Ŝiaj esploroj traktas interalie protekton de lagoj kaj malsekregionoj, la tradukarton kaj instruadon de Esperanto. Ŝi studis pri Interlingvistiko 2021–2024 ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando). Ŝi estas aktuale estrarano de la Universala Esperanto-Asocio kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Retadreso: arko.gong@gmail.com

ORCID-numero: 0000-0002-6708-4953

About the author

GONG Xiaofeng (Arko) is a retired professor of environmental science and engineering with a doctorate in food science at Nanchang University (China). Her research interests include lake and wetland protection, the art of translation, and Esperanto teaching. She studied Interlinguistics from 2021 to 2024 at Adam Mickiewicz University in Poznań (Poland). She is also a member of the Universal Esperanto Association Board and a member of the Academy of Esperanto.

作者简介

弓晓峰 (Arko) 是南昌大学环境科学与工程专业退休教授，具有食品科学博士学位。研究方向涉及湖泊与湿地保护研究、翻译艺术以及世界语教学等多个领域。她于2021年至2024年在波兰波兹南密茨凯维奇大学攻读语际语言学。现任国际世界语协会领导成员和世界语学院院士。

Derivational Word Formation in Chinese, English, and Esperanto: A Typological Comparison

Abstract: This article compares the derivational word-formation strategies of Chinese, English, and Esperanto. It shows that although all three languages employ various strategies to create new lexical units, the mechanisms, degrees of regularity and levels of productivity differ significantly. In Chinese, word formation is primarily based on compounding, while derivational phenomena also appear in the form of affixation and limited tone alternations. Tone alternations with a derivational function are a notable feature, through which verbs can be transformed into nouns or other word classes, often without changes in the written form or with only partial orthographic modifications. In Esperanto, word formation is highly regular and transparent, based on systematically combinable roots and affixes. In English, derivation

presents a mixed system involving affixation, conversion, and stress shift. The study shows that considering morphological, phonological, and typological factors is essential for understanding the nature of derivational word formation.

Keywords: derivational morphology, word formation, affixes, tone alternation, Chinese language, English language, Esperanto

汉语、英语与世界语中的派生构词：类型学比较

摘要：本文比较了汉语、英语和世界语中的派生构词手段。研究表明，尽管三种语言都采用多种策略来创造新的词汇单位，但其机制、规则性程度和构词水平存在显著差异。在汉语中，词汇构词主要依赖合成，同时也存在以词缀和有限的声调变化形式出现的派生现象。具有派生功能的声调变化是一项显著特征，它可以使动词转化为名词或其他词类，通常不改变书写形式或仅有部分书写变化。在世界语中，词汇构词高度规则且透明，基于可系统组合的词根和词缀。在英语中，派生呈现出一种包含词缀化、词类转换和重音变化的混合系统。本研究表明，从形态、音系和类型学角度进行综合考察，对于理解派生构词的本质具有重要意义。

关键词：派生形态学，构词法，词缀，声调变化，汉语，英语，世界语